

Kronviruso

Kiel utilas la hejmrestado?

ellaborita de Agathe Dahyot, Maxime Vaudano kaj Mella Zerbib - Les Décodeurs


Publikigita la 2an de aprilo 2020

Le Monde

Tradukversio de la 17a de aprilo 2020



Duono de la homaro estas nun enhejma.

The background of the entire image is a repeating pattern of coronavirus particles. Each particle is depicted as a spherical entity with a textured, granular surface and a prominent outer ring of numerous spike-like protrusions, characteristic of the SARS-CoV-2 virus. These particles are arranged in a grid-like fashion, with some appearing larger and more detailed than others, creating a dense, textured visual field.

Registaroj efektivigis tiun unuafojan rimedon por kuraĝigi
homan interdistanciĝon.

Kaj tiel malrapidigi disvastiĝon de la kronviruso.



**Sed ĉi tiu strategio estas foje miskomprenita de
la loĝantaro.**

Kial mi restu hejme?



The background is a high-contrast, black and white halftone image of a person's face, possibly a woman, looking slightly to the side. The image is composed of a dense grid of dots. Three bright yellow circles are overlaid on the image, highlighting specific areas: one on the lower left cheek, one on the upper right forehead, and one on the lower right cheek.

La logiko de hejmrestado fontas el la konstato,
ke ĉiuj povas transdoni la viruson.

Sed mi ne havas simptomon !



Tio nenion signifas.


La simptomoj povas aperi ĝis 14 tagoj post la infektiĝo.

neniu simptomo



T1 T2 T3 T4 T5 T6 T7 T8 T9 T10 T11 T12 T13 T14

tusado, febro...



La simptomoj povas aperi ĝis 14 tagoj post la infektiĝo.


Kaj la kontaĝa risko aperas eĉ pli frue.

neniu simptomo



T1 T2 T3 T4 T5 T6 T7 T8 T9 T10 T11 T12 T13 T14

tusado, febro...



Por la plejparto de la infektitaj homoj, la
simptomoj feliĉe neniam aperas.





**Sed tiuj "sanaj virusportantoj" restas
eventuale kontaĝaj.**

(Dum kiom da tempo? Ĝis nun, oni tion ne scias.)

Kaj se mi sukcesis eskapi la viruson?



**Elhejmiġinte, vi riskas preterpasi
kontaġan homon kaj infektiggi.**




Sed atentas mi kiam mi elhejmiĝas !



**Sed eĉ respektante la sekurdistancojn, la transdono
de la viruso eblas.**

**Sed eĉ respektante la sekurdistancojn, la transdono
de la viruso eblas.
Eĉ ĉe interparolilo.**



**Sed eĉ respektante la sekurdistancojn, la transdono
de la viruso eblas.
En la supervendejo.**



**Sed eĉ respektante la sekurdistancojn, la transdono
de la viruso eblas.
En transportrimedoj.**



Ju pli vi kontaktas aliulojn, des pli la risko pliigas.

**Ni imagu, ke vi estas infektita. Dum unu semajno,
vi vivos normale, sen suspekti ion ajn.**




**Ni imagu, ke vi estas infektita. Dum unu semajno,
vi vivos normale, sen suspekti ion ajn.**


Kaj vi malsaniĝos.



Ni imagu plu: dum ĉi tiu semajno, vi elhejmiĝis 18 fojojn,
vi renkontis 100 homojn kaj infektis tri el ili.



Se vi estus elhejmiĝinta nur 6 fojojn, vi estus renkontinta nur 33 homojn kaj estus infektinta nur unu.



Temas nur pri unuopa kazo ...



Elerariĝu.

La statistikoj montras, ke hejmrestado havas realan efikon.

Oni taksas, ke ĉiu infektita homo povis averaĝe kontagi

3 personojn antaŭ la hejmrestado.



Oni taksas, ke ĉiu infektita homo povis averaĝe kontaĝi

3 personojn antaŭ la hejmmrestado.

Ĉi tiu nombro povas fali ĝis 1,5 per bone respektata hejmmrestado.





Ja tio ne multon ŝanĝos...



El tiu vidpunkto, la diferenco povas ŝajni eta.


Sed pripensu pri tio, kio okazas grandskale...

Ni konsideru la ekzemplon de loĝantaro kun 5 origine kontaĝaj homoj:




Ni konsideru la ekzemplon de loĝantaro kun 5 origine kontaĝaj homoj:

Po 3 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la epidemio disvastiĝas tre rapide:



ĉiu el 5 virusportantoj infektas 3 homojn
→ 15 novaj virusportantoj
20 infektitoj post 8 tagoj


Po 1,5 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la disvastiĝado estas ege malrapidigata:



ĉiu el 5 virusportantoj infektas 1,5 homojn
→ 8 novaj virusportantoj
13 infektitoj post 8 tagoj


Ni konsideru la ekzemplon de loĝantaro kun 5 origine kontaĝaj homoj:

Po 3 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la epidemio disvastiĝas tre rapide:



ĉiu el 15 virusportantoj infektas 3 homojn
→ 45 novaj virusportantoj
65 infektitoj post 15 tagoj


Po 1,5 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la disvastiĝado estas ege malrapidigata:



ĉiu el 8 virusportantoj infektas 1,5 homojn
→ 11 novaj virusportantoj
24 infektitoj post 15 tagoj


Ni konsideru la ekzemplon de loĝantaro kun 5 origine kontaĝaj homoj:

Po 3 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la epidemio disvastiĝas tre rapide:



ĉiu el 135 virusportantoj infektas 3 homojn
→ 405 novaj virusportantoj
605 infektitoj post 30 tagoj


Po 1,5 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la disvastiĝado estas ege malrapidigata:



ĉiu el 17 virusportantoj infektas 1,5 homojn
→ 25 novaj virusportantoj
66 infektitoj post 30 tagoj


Ni konsideru la ekzemplon de loĝantaro kun 5 origine kontaĝaj homoj:

Po 3 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la epidemio disvastiĝas tre rapide:



ĉiu el 405 virusportantoj infektas 3 homojn
→ 1215 novaj virusportantoj
1820 infektitoj post 38 tagoj

Po 1,5 kontaĝoj por ĉiu virusportanto,
la disvastiĝado estas ege malrapidigata:



ĉiu el 25 virusportantoj infektas 1,5 homojn
→ 38 novaj virusportantoj
104 infektitoj post 38 tagoj

Tio nur malrapidigas la epidemion, tio ne haltigas ĝin...




Lukti kontraŭ epidemio, estas kiel tempokonkurso.

Ŝpari
tempon estas strategie.

Platigante la kontaĝkurbon, oni unue limigas plenŝtopitecon de malsanulejoj.


Sen agrimedoj cele al malrapidigo, la nombro de malsanuloj estas tro alta por ke ĉiuj estu samtempe prizorgataj.



Per tiaj agrimedoj, malsanulejoj povas akcepti malsanulojn en pli bonaj kondiĉoj, kaj limigi la nombron de mortotaj homoj.


**Alia avantaĝo: dum la hejmmrestado,
la virusa dominpremo malpliigas.**

**La infektitaj homoj forigas la viruson el sia korpo:
ekde tiam ili estas imunigitaj kaj ĉesas esti kontaĝaj.**




Ĉu oni certas, ke tio sufiĉos por venki la epidemion?





Malfeliçe ne...

La risiko estas, ke la epidemio reŝprucos
duan fojon se tro da homoj infektitaj kaj kontaĝaj samtempe
elhejmiĝas post la hejmrستا periodo.




**Efektive, ĝis 60% de la loĝantaro ne estis infektita,
la epidemio povas revigliĝi.**

**Tio estas la malbona flanko de la hejmrastado:
protektante la loĝantojn,
oni malhelpas ilin imuniĝi.**

**Por venki la kronviruson, mastrumi la posthejmrestadon
estos do fundamente.**

**Por venki la kronviruson, mastrumi la posthejmrestadon
estos do fundamente.**

**Amasaj elserĉaj testoj, perioda aŭ cela hejmrestado, postspurado
de kontaktoj de infektitaj homoj... pluraj ebloj restas konsiderindaj.**



Sed ni ne jam estas ĉe tiu etapo.

Fontoj kaj metodologio

La ekzemploj kaj terminoj uzitaj en ĉi tiu artikolo estas vole tre simpligitaj, same la uzitaj nombroj estas teoriaj. Sed ili baziĝas sur realistaj grandskalaj hipotezoj.

Por la **reproduktiĝoblo** (R_0 la averaĝa nombro de homoj, infektitaj de unu malsanulo), ni baziĝis sur la alta kaj malalta hipotezoj de la studo de la EHESP (R_3 antaŭ la hejmrastado kaj $R_{1,5}$ dum la hejmrastado). Tiu oblo, malfacile kalkulebla, fine de marto estis taksata ĉirkaŭ 2,5 en Francio.

Per la sama hipotezo necesus, ke ĉirkaŭ 60% de la loĝantaro estu infektita por ke **grup-imuno** aperu kaj ĉesigu definitive la epidemion, laŭ studo aperinta la 9an de marto en *The Lancet*.

La averaĝan **inkubacian periodon** (tempo inter la infektiĝo kaj la ekapero de simptomoj) la Instituto Pasteur taksis 5 tagojn, sed povas etendiĝi ĝis 14 tagoj, laŭ MOS (monda organizaĵo pri sano). MOS taksas ankaŭ, ke la pacientoj povas esti kontaĝaj inter 24 ĝis 48 horoj antaŭ la apero de simptomoj.

La **intertempo inter du "generacioj"** de infektitaj homoj taksis 7,5 tagojn ĉina studo de la 26a de marto aperinta en NEJM.

La kontaĝeco de la "sanaj virusportantoj" (aŭ sensimptomuloj) estas ankoraŭ malbone konata, eĉ se kazoj de virustransdono estas konstatitaj.

Vidu ankaŭ

- **Comment l'épidémiologie tente de cerner l'épidémie**
- **"Aplatir la courbe" des contaminations, l'enjeu des semaines à venir**
- **Notre entretien avec l'épidémiologue Pascal Crépey, co-auteur de l'étude de l'EHESP**